**Praha-ek-1955-29-08**



TUTŜTATA KONSULTA KOMITATO ESPERANTISTA

I-a Tutŝtata konferenco de Esperantistoj-Padefendantoj en ĈS R.

En la tagoj de 7a-10a de julio 1955 okazis en urbo Otrokovice I-a Tutŝtata konferenco de Esperantistoj-Pacdefendantoj en Ĉeĥoslovakio. Partoprenis ĝin entute 316 delegitoj el 90 lokoj el ĉiuj partoj de la ŝtato kaj 9 eksterlandaj gastoj /el Aŭstrio, Danio, Francio, Svedio kaj Usono/. La konferenco estis ekkomencita ĵaŭde la 7. 7. 1955 per prelego de s-ano Rudolf Burda, prezidanto de MEM /Mondpaca Esperanto-Movado/ je la temo „Kiajn taskojn havas Esperanto en la tutmonda movado de Pacdefendantoj“. Post ĝi estis solene malfermita ekspozicio „Popoloj de ĉiuj landoj en batalo por konservi la pacon“, enhavanta tre riĉan materialon pri paca laboro de esperantistoj ĉeĥoslovakaj kaj eksterlandaj. Vespere estis aranĝita por la gekonferencanoj interkona amuzado. Vendrede la 8.7. antaŭtagmeze estis dediĉita al du prelegoj: unu pri la atombombo en Hiroŝimo /prelegis s-ano prof. Kožený/, dua pri spertoj de ĉeĥa laborista mondvojaĝanto s-ano Pech je la temo „Per Esperanto tra la mondo“. Posttagmeze kunvenis ĉeestantaj gvidantoj de Esp. rondetoj por pritrakti diversajn organizajn problemojn. Vespere en granda salono de uzinklubo prelegis s-ano Josef Vítek el Praha je la temo „Nordaj landoj“. La prelego akompanata per koloraj filmoj estis publika kaj ekvekis inter loka loĝantaro viglan intereson pri Esperanto. Sabate la 9.7. antaŭtagmeze ĉeestis prelegojn pri „Marksismo en lingvistiko“ /s-ano prof. Kožený/ kaj pri UNESCO /s-ano Miloš Rudolf/ tre multaj aŭskultantoj. Posttagmeze prelegis kvar literaturaj fakuloj /s-anoj Ginz, Kořínek, Omelka kaj Urban/ pri Esperanto en literaturo. Je la 16-a horo kunvenis delegitoj de Junulargrupoj en speciala kunsido por pritrakti aferojn de Junular-movado en ĈSR. Vespere estis prezentita altvalora arta programo, kiun preparis artisma grupo „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ el Praha.
Dimanĉe la 10.7. matene en loka preĝejo celebris por interesuloj katolikan meson s-ano P. Macek, kanoniko el Mikulov. Je la 9a horo estis malfermita ĉefa laborkunsido de la konferenco. Ĉefreferatojn prelegis s-ano Rudolf Burda je la temo „Esperantista pacmovado“ kaj s-ano Josef Vítek je la temo „Esperanto-interkomprenilo de nacioj“. Poste alparolis la ĉeestantojn reprezentanto de uzinklubo de nacia entrepreno Svit, en kies kadro Esperanto-rondeto en Otrokovice laboras, reprezentantoj de loka publika vivo kaj eksterlandaj gastoj. Estis ankaŭ tralegitaj alvenintaj salutleteroj, inter kiuj speciale grandan intereson ekvakis tiu de s-ano Bokarev el Moskvo. Posttagmeze parolis reprezentanto de slovakaj Esperantistoj Dro L. Izák kaj plua tempo estis dediĉita al diskutado. Post ĝia finiĝo estis prezentita kiel plej grava punkto de la programo pritrakti aferon de Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en ĈSR, kiu en provizora formo estis kreita en januaro 1955 dum laborkonferenco de Esp.rondetoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc kaj kies cele estas kunordigi la agadon de ĉiuj Esperanto-rondetoj en la ŝtato kaj helpi diversrimede al tiuj, kiuj ne havas ankoraŭ sufiĉe da spertoj aŭ kiuj nur la laboron ekkomencas. La kreo de TKKE estis unuanime aprobita kaj en voĉdonado pri ĝia estraro estis kiel prezidanto elektita s-ano Josef Vítek el Praha, kiel sekretario s-ano Miloš Rudolf el Olomouc. Estis interkonsentite krei tri ĉefajn sekciojn: porpacan, organizan kaj lingvan. Kiel gvidanto de la sekcio por pacmovado estis elektita s-ano Rudolf Burda el Plzeň, gvidanto pro organizaj aferoj s-ano Josef Kožený el Kutná Hora, gvidanto por lingvaj aferoj s-ano Tomáš Pumpr el Praha. Estis aprobita ankaŭ propono, ke oficiala organo de TKKE estu bulteno „Nia Spegulo“, redaktata de s-ano Ján Lamačka el Trenčín.

Dro Vladimír Mohapl